

# Sennaciulo

Oficiala organo de sennacieca asocio tutmonda

Septembro 2002


ISSN 1163.0442

*\*Pri la enhavo de artikoloj respondecas la aŭtoroj mem\**

<http://www.sat-esperanto.org/> \*\*\* retadreso: [satesper@noos.fr](mailto:satesper@noos.fr)

73-a jaro, n-ro 9 (1167)

MENSUEL/MONATA



Dum la kongreso  
aperis la Nova  
PIV !

Ĉu vi jam akiris  
ĝin ?

Prezo:

por Francio 70 € +  
4,27 €(afranko)

por Eŭropo 70 € +  
7 € (reg.afranko)

ekster Eŭropo 70  
€ + 9 € (reg.afr.)



SUPRE LA INTERNO KAJ SUBE LA EKSTERO DE NIA KONGRESEJO

**SAT-ANOJ KUTIMIĜU AL EKSTERNACIA SENT-, PENS-, KAJ AGADKAPABLO! LANTI**

## El la redaktejo...



*Karaj gekamaradoj,  
pro neatenditaj proble-  
moj de la registraĵo de  
niaj laborkunsidoj en  
Alikanto (tro da eĥo en*

*la amfiteatro), la detala protokolo  
aperos en oktobra Sennaciulo.*

*Kiel vi povas konstati, tiu ĉi  
numero estas tre varia kaj traktas  
multajn diversajn aferojn. Mi esperas  
ke ĉiu el vi trovos ion interesan.*

*Mi daŭre invitas vin al  
kunlaboro en Sennaciulo. Sendu al la  
redakcio aktualajn informojn pri la  
sociaj kaj socialaj eventoj en via  
regiono kaj lando. Informu niajn  
legantojn pri la vivo de laboristoj kaj  
ordinaraj homoj. Interŝanĝu spertojn  
kaj informojn kun la aliaj. Estus bone  
se vi povus ankaŭ ilustru viajn  
artikolojn.*

*Ankaŭ pensu, laŭeble, ĉi-jare  
venigi al SAT almenaŭ unu novan  
membron. Tiel nia Asocio  
pligrandiĝos kaj pli facile plenumos  
sian rolon. Dankon. Kamaradece,*

*via Redaktoro*

Asocia sidejo de S.A.T., administrejo kaj  
redaktejo: 67, avenue Gambetta, FR-75020  
Paris, tel. +33.1.47.97.87.05, telekopiilo:  
+33.1.47.97.71.90.

Retadreso: satesper@noos.fr.

TTT-paĝoj:

<http://www.sat-esperanto.org>

Oficejo malfermita: lunde de 9h30-15h30;  
de mardo ĝis vendredo: 9h30-16h30. Ekster  
la laborhoroj funkcias aŭtomata registrilo.

Poŝtkonto: SAT n° 1234-22 K, Paris.

Redaktas: Redakta Komitato - P. Lévy, G.  
Rollin kaj K. Barkovič.

Ĉefredaktoro : Kreŝimir Barkovič

Ekspedejo de Sennaciulo: adreso de la  
redaktejo.

Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la  
aŭtoroj mem. Ricevitajn manuskriptojn oni  
ne resendas. La limdato de ricevo de  
manuskriptoj estas la 10-a de kuranta  
monato.

\*

Imprimé par : S.I.B., B.P. 343, FR-62205  
Boulogne-sur-Mer Cedex, Francio.

Aperas monate - Mensuel.

Le directeur de la Publication: Jacques  
BANNIER

Abonnement annuel/jara abono France 52€  
Autres pays/aliaj landoj : peti la tarifon de  
nia peranto aŭ de la SAT-Centro.

Dépot légal à la date de parution.

Commission Paritaire n° AS-74399

Limdato por ricevo de kontribuajoj estas  
ĉiam la 10-a en la monato.

## GRAVE!

### Nova konto en Germanio!

Nia landa peranto, k-do Proskovec informas nin ke ŝanĝiĝis  
SAT-konto por la kotizoj kaj aliaj pagoj. Bonvolu do noti:

Numero : 4 907 664 100

Bankkodo : 760 260 00

NORISBANK

**KAVA-PECH**



## La eldonejo de nia k-do Petro Chrdle grave suferis pro inundo !

Dum la UK en Brazilo, kiun li partoprenis, gravega inundo  
tute detruis la kompletan librostokon de la eldonejo KAVA-PECH  
(apud Prago), kiu zorgis pri la presado de nia Nova PIV. La akvo  
rapidege alvenis kaj atingis la altecon de pli ol 2 metroj. Oni povis  
savi iom da informadika materialo sed la libroj estis detruitaj. La  
stokejo ne estis asekurita. La valoro de detruitaj libroj estas  
proksimume 50000 € - kaj pli ol triono de tiuj libroj estis en Esperanto  
aŭ pri Esperanto.

Do, tiuj gekamaradoj kiuj ŝatas Esperanto-literaturon kaj pretas  
helpi savi Esperanto-eldonejon KAVA-PECH, bonvolu reagi.  
Jen kion interalie skribis k-do Chrdle:

«Al ĉiuj, kiuj afable helpos restarigi mian eldonejon, mi anti-  
cipe dankas. Estas klare ke mi esprimos mian dankon ankaŭ poste,  
interalie ĉiuj donacantoj ricevos la sciigon, kiom da mono kolektiĝis,  
kiu donacis (krom se iu deziras resti anonima), por apero de kiuj  
libroj ilia mono estis uzita (estos nur por la libroj en Esperanto aŭ pri  
Esperanto!).

Do, se iu el vi ŝatus kontribui (mi vere ne atendas grandajn  
donacojn kaj danke akceptos ankaŭ malgrandajn sumetojn), eblas plej  
simple pere de mia konto ĉe SAT kun indiko «por Kava-Pech» aŭ de  
mia konto ĉe pchr-s ĉe UEA. Eventuale ni interkonsentos pri alia  
eblo, ke ni ne nutru bankojn per internaciaj ĝiroj (ĉe malgrandaj sumoj  
ili povas eĉ superi la sendatan kvanton da mono)».

K. Barkovič (laŭ la letero de Petro sendita al kelkaj geamikoj).

### ATENTIGO AL NIAJ KUNLABORANTOJ

Ni petas ĉiujn niajn kunlaborantojn sendi al ni siajn tekstojn ĉu per la reto  
en la formato de teksto aŭ sur la disketoj en la formatoj de Word, Apple  
(Clar)Works, aŭ prefere en la formato RTF. Bonvolu nepre tajpi viajn  
tekstojn per la sistemo x (cx = ĉ, sx=ŝ ktp) ĉar tio ebligas al ni facile  
transformi la tekston en normalan Esperanton. Se vi sendas tekstojn  
surpapere, vi tajpu ilin normale. Dankon.

La Redakcio

# OSIEK - PREMIO al k-do Barkoviĉ



*Sekve al la lastmomenta informo el la julia-aŭgusta Sennaciulo (p. 112):*

Ni ĵus ricevis oficialan informon ke dum la lasta IEK en Loveno (Belgio) estis atribuita OSIEK

premio al nia k-do Kreŝimir Barkoviĉ pro la traduko de libro «7000 tagoj en Siberio». Tiu ĉi libro estas eldonita de SAT en 1983. En tiu ĉi 496-paĝa verko, Karlo Štajner, sincera komunista fidela al sia idealo kaj konscia ke tio kio konstruiĝis en Sovetio ne estis socialismo, priskribis sian preskaŭ 20-jaran restadon en Siberia gulago.

Tiu ĉi bone tradukita verko ne devas esti forgesita kaj ĝi ne devas forgesigi ke centmilionoj da homoj suferegas kaj mortas nuntempe ne plu pro tia karikaturo de la socialismo sed sub ne malpli kruela formo, pro mafia doktrino: la ekonomia liberalismo.

Mendebla ĉe SAT.

Prezo inkluzive afrankon:

por Eŭropo : 24,47 Eŭroj

ekster Eŭropo : 26,12 Eŭroj.

**Jen la oficiala informo:**

**Kara Kolego,**

Nome de OSIEK, kun granda ĝojo mi mesaĝas ke vi ricevis la OSIEK-premion 2002 pro via traduko de «7000 TAGOJ EN SIBERIO» ( de Karlo Štajner).

La sekreta voĉdonado por la premio okazis la pasintan vendredon, la 26an de julio, dum la IEK (Internacia Esperanto-Konferenco) en Loveno, Belgio. Sesdeko da ĉeestantaj OSIEK-anoj partoprenis en la baloto.

Plej varmajn gratulojn.

Madeleine de Zilah

OSIEK-komitatanino pri OSIEK-premio

## KROATA INFORMO PRI OSIEK - PREMIO

The screenshot shows the Vjesnik website interface. At the top, there are logos for 'VJESNIK HRVATSKI POLITIČKI DNEVNIK ON-LINE', 'HThinet OFFICE I OFFICE SUPER PLUS paketi', and 'HThinet'. Below the logos, there is a navigation menu with options like 'HOME', 'WWW ARHIVA', 'PDF ARHIVA', and 'kultura'. The main content area features the title 'Barkoviĉu nagrada za prijevod Štajnerovih memoara' and a sub-headline 'ZAGREB, 8. kolovoza - Na međunarodnoj esperantistoj konferenciji u belgijskom gradu Louvenu nagradu za najbolji esperantisti prijevod publicistike dobio je zagrebački esperantist Krešimir Barkoviĉ, izvjestio je u četvrtak Hrvatski savez za esperanto. Šesdeset sudionika, na konferenciji koja je održana od 20. do 26. srpnja, proglasilo je za najbolji prijevod na esperanto knjiga Karla Štajnera »7000 dana u Sibiru«, koju je u prijevodu Krešimira Barkoviĉa izdala međunarodna esperantska organizacija Sennacia Asocio Tutmonda iz Pariza. Knjiga »7000 dana u Sibiru« Karla Štajnera (1902.-1992.) objavljena je 1971. u Zagrebu, doživjela je 24 izdanja i prodana u 760 tisuća primjeraka. Esperantsko izdanje »7000 dana u Sibiru« ilustrirao je Augusto Storani. Knjiga je opremljena zemljovidom i predgovorom o piscu te bilješkama prevoditelja Barkoviĉa, koji trideset godina živi u Parizu. Krešimir Barkoviĉ (1944.) završio je gimnaziju u Zagrebu, gdje je studirao na Medicinskom fakultetu. Esperantist je od 1966., glavni je urednik esperantskih novina Sennaciulo i glavni tajnik esperantske udruge Sennacia Asocio Tutmonda. (Hina)

At the bottom of the screenshot, there is contact information for VJESNIK d.d., including phone numbers and email addresses.

La kroata presagentejo «HINA» kaj la ĉefjurnalo «VJESNIK» aperigis informon pri tiu OSIEK-premio (vidu supre la informon de la TTT-paĝo de «Vjesnik» de la 9-a de aŭgusto : <<http://www.vjesnik.hr/html/2002/08/09/Clanak.asp?r=kul&c=6>>

Jen la traduko de la teksto :

### Al Barkoviĉ la premio por la traduko de memorajoj de Štajner

**Zagrebo, la 8-an de aŭgusto** - Dum la internacia esperantista konferenco en belga urbo Loveno, la premion por la plej bona traduko de publikaĵo ricevis la zagreba esperantisto Kreŝimir Barkoviĉ, informis ĵaŭde Kroata Esperanto-Ligo. Sesdeko da partoprenantoj de la konferenco, kiu okazis inter la 20-a kaj 26-a de julio, proklamis la plej bonan tradukon al Esperanto, la libron de Karlo Štajner, «7000 Tagoj en Siberio», kiun en la traduko de Kreŝimir Barkoviĉ eldonis internacia esperanto-asocio Sennacieca Asocio Tutmonda el Parizo. La libro «7000 tagoj en Siberio» de Karlo Štajner (1902-1992) aperis en Zagrebo en 1971, havis 24 eldonojn kaj estis vendita en 760000 ekzempleroj. Esperantan eldonon de «7000 tagoj en Siberio» ilustris Augusto Storani. La libro estas ekipita per geografia karto, antaŭparolo de la aŭtoro kaj la notoj de tradukisto Kreŝimir Barkoviĉ, kiu jam de tridek jaroj vivas en Parizo. Kreŝimir Barkoviĉ (1944) finis gimnazion en Zagrebo, kie li studis en Medicina fakultato. Esperantisto de 1966, li estas ĉefredaktoro de esperantista gazeto «Sennaciulo» kaj estas ĝenerala sekretario de esperanto-asocio Sennacieca Asocio Tutmonda. (Hina)